


Kiel blankaj sangoĉeloj estas trejneblaj



Somalia: laŭ Human Rights
Watch, Al Ŝabab rekrutigas
pli kaj pli da infanoj

KDPR konfirmis
interkonsenton kun Sud-
Koreio pri partopreno en
Vintraj Olimpikoj

Trovitas ligo inter
eksplodoj de supernovaoj
kaj vetero surtere

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печёнкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Britaj leĝdonantoj aprobis leĝprojekton pri retiro el EU

Ŝlosila stadio en la Ĉambro de Reprezentantoj p. 03

KDPR konfirmis interkonsenton kun Sud-Koreio pri partopreno en Vintraj Olimpikoj
Skaloj kaj agadplanoj p. 03

Libia marborda gardistaro savis 234 nelegajn enmigrintojn el maro

Libia okcidenta marbordo p. 04

Lernotago estis nuligita pro malvarmego da -67°C

Rusia regiono de Jakutio p. 04

TILLERSON: Usono konservas militan ĉeeston en Sirio

Kiel rimedo por protekti siajn interesojn de nacia sekureco p. 05

Usono frostigis mondonacon al palestinaj rifuĝontoj

65 milionojn da usonaj dolaroj p. 05

Somalia: laŭ Human Rights Watch, Al Ŝabab rekrutigas pli kaj pli da infanoj

Centoj da junuloj perforte rekrutigitaj p. 06

Kiel blankaj sangoĉeloj estas trejneblaj

La homa imunsistemo havas memoron p. 07

Trovitas ligo inter eksplodoj de supernovaoj kaj vetero surtere

Kosmaj radioj p. 08

Rubén DARÍO

Nikaragva poeto p. 09

Hodiaŭe

Edgar Allan Poe p. 11

Britaj leĝdonantoj aprobis leĝprojekton pri retiro el EU

La maratona leĝprojekto pavimanta la vojon por la eliro de Britio el la Eŭropa Unio trapasis ŝlosilan stadion en la Ĉambro de Reprezentantoj merkrede [17 jan 2018] nokte.

Per subteno de 324 parlamentanoj, kaj opono de 295 parlamentanoj, la registara plimulto de nur 29, la leĝprojekto pri Eliro de la EU



intencas konverti la tutan eŭropan leĝon al brita leĝo.

La leĝprojekto estas submetita al la Senato, kie ĝi spertos pli striktan ekzamenon kaj defiojn el EU-favoraj neelektitaj egaluloj.

Sed politikaj komentistoj diris, ke la adopto de la leĝprojekto en la Ĉambro de Reprezentantoj estis grava mejloŝtono sur la vojo de la eliro de Britio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

KDPR konfirmis interkonsenton kun Sud-Koreio pri partopreno en Vintraj Olimpikoj

La Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR) merkrede [17 jan 2018] konfirmis interkonsenton kun Sud-Koreio pri la skaloj kaj agadplanoj de la partopreno de la KDPR en la Vintraj Olimpikoj en *Pyeongchang* en la venonta monato.

La Korea Centra Novaĵ-Agentejo diris, ke la labornivela intertraktado inter la KDPR kaj Sud-Koreio merkrede en la Paca Domo sur la suda flanko en la armistica vilaĝo de *Panmunjom* studis la praktikajn aferojn rilatajn al la sukcesa okazigo de la 23aj Vintraj Olimpikoj kaj adoptis komunan



gazetaran komunikaĵon.

La Korea Centra Novaĵ-Agentejo diris, ke la komunikaĵo tuŝas la skalojn kaj agadplanojn de delegacio de la Nacia Olimpika Komitato, sportisa teamo, huraa grupo, taekvond-prezentada grupo kaj ĵurnalista delegacio de la KDPR por partopreno en la 23-aj Vintraj Olimpikoj, la Sud-korean liveradon de oportunoj al ili kaj la sendon de delegacio de la KDPR por surloka esploro.

La intertraktado, la tria inter la du flankoj en 10 tagoj, estis ĉeestata de delegacio de la norda flanko gvidata de JON Jong Su, vicprezidanto de la Komitato por Paca Reunuigo de la Lando kaj delegacio de la suda flanko kun CHUN Hae-sung, vicministro pri reunuigo kiel la ĉefdelegito.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Libia marborda gardistaro savis 234 neleĝajn enmigrintojn el maro

Proparolanto de la Libia mararmeo, Ayob QASSEM, diris al la ĉina novaĵ-agentejo

Xinhua [新华社 xīnhuáshè], ke la Libia marborda gardistaro merkrede [17 jan 2018] savis 234 neleĝajn

enmigrintojn el arabaj kaj afrikaj landoj, inkluzive de virinoj kaj infanoj, kiuj estis sur du rompitaĵoj kaŭĉukaj ŝipoj en la maro proksima al la libia okcidenta marbordo.



La savado estis efektivigita en du apartaj fazoj. La unua boato estis savita norde de la regiono *Mellita*, kaj la dua ŝipo estis savita norde de la urbo *Zuwara*, 120 kilometrojn okcidente de la ĉefurbo Tripolo.

La savitaj enmigrintoj ricevis humanitaran helpon. Ili estis transigitaj al la mararmea bazo en Tripolo kaj poste transdonitaj al la Departemento

kontraŭ Neleĝa Inmigrado.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Lernotago estis nuligita pro malvarmego da -67°C

En la fora rusia regiono de Jakutio [Respubliko *Saĥa* (Jakutio) Саха Өрөспүүбүлүкэтэ, Саха Сирэ], kelkaj lokoj spertis subnulan 67-celsigradan temperaturon, la 16-an de januaro.



Tiu regiono estas 5 300 kilometrojn malproksime de Moskvo, kun miliono da loĝantoj, kies lernejoj estas alkutimiĝantaj frekventadi la lernejojn eĉ tiam, kiam la temperaturo trafas -40°C. Lastmarde [16 jan 2018] la lernotago estis nuligita, kaj la polico ordonis al gepatroj, ke

ili tenu siajn filojn hejme.

La vilaĝo *Ojmjakon* [Өймөкөөн] elstaras inter la plej malvarmaj lokoj en la mondo, kaj en la jaro 2013 tie estis registrita historia rekordo -71°C.

Tamen, pro alkutimiĝo de la loka loĝantaro je tia frostiga temperaturo, la ĉi-semajna malvarmo eĉ ne reliefigis ĉe amaskomunikiloj, kiuj

nur aperigis memfotadojn de la homoj tiurilate. Virinoj afiŝis bildojn montrantajn okulharojn plene kovritajn de glacio.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

TILLERSON: Usono konservos militan ĉeeston en Sirio

Usona Ŝtatsekretario Rex TILLERSON diris merkrede [17 jan 2018], ke Usono konservos sian militan ekziston en Sirio.

"Konservo de milita kaj diplomacia ĉeesto en Sirio estas grava por nia nacia defendo," TILLERSON diris dum sia prelego pri la siria demando en *Stanford-Universitato*, Kalifornio.

"Preskaŭ ĉiuj teritorioj en Irako kaj Sirio iam regitaj de la ekstremisma grupo Islama Ŝtato

estis liberigitaj, kaj la Islama Ŝtato ne povis reakiri unu [kvadratan] futon da tiu tero," TILLERSON diris en la prelego, kiu estis publikigita de la Usona "Departemento de Ŝtato" [Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj].



Tamen TILLERSON atentigis, ke la radikala grupo ankoraŭ ne estas komplete disvenkita, kaj Usono daŭrigos la partoprenon kiel rimedon por protekti siajn interesojn de nacia sekureco.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Usono frostigis mondonacon al palestinaj rifuĝontoj

Proparolanto de la "Departemento de Ŝtato" [Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj] diris marde [16 jan 2018], ke Usono informis la institucion de UN pri helpado al palestinaj rifuĝintoj, ke ĝi retenos 65 milionojn da usonaj dolaroj por antaŭenigi la reformon de la agentejo.

Proparolanto Heather NAUERT diris en gazetara konferenco, ke Usono tiutage

sendis leteron al la agentejo por informi ĝin pri la decido. Ŝi diris, ke la frostigita sumo estos konservata por venonta konsidero anstataŭ esti nuligita. Ŝi aldonis, ke unu el la aferoj, kiujn Usono ŝatas fari, estas vidi reformojn de la agentejo



Malgraŭ la frostigo, Usono ankoraŭ promesis memvole donaci 60 milionojn da usonaj dolaroj en 2018 por garantii, ke la agentejo ne estos fermita.

Yu
Ĉina Radio Internacia



Somalia: laŭ *Human Rights Watch*, *Al Ŝabab* rekrutigas pli kaj pli da infanoj

Human Rights Watch kondamnas, en nova raporto, kampanjon pri rekrutigoj de infanoj fare de *Al Ŝabab* en Somalia. Laŭ HRW, la islamismaj batalantoj pli kaj pli minacas la civilulojn, trudante ilin liveri junulojn. En sia enketo, la NRO de defendo de la homaj rajtoj mencias centojn da junuloj perforte rekrutigitaj de la terorisma grupo.

La raporto de HRW elvokas infanojn kelkafoje nur okjarajn. Ili estas elŝiritaj el siaj familioj, kaj poste enkondukitaj en grandajn koranajn lernejojn *Al Ŝabab*. Tie, ili estas submetitaj al cerbolavado, devigataj sekvi la dogmojn de la teroristoj, kaj finfine ofte fariĝas batalantoj.

Jam de jaroj, la islamistoj forkaptas infanojn. Antaŭe, ili faris tion prepare al batalo, do foroferis la infanojn. Sed laŭ Laetitia BADER, kiu enketis, temas ĉi-foje pri maniero akiri

monrimedon. Efektive, multaj komunumoj, ĉefe la plej malriĉaj, ne plu kapablas pagi la impostojn altruditajn de *Al Ŝabab*. Interalie pro la sekeco. Do la teroristoj ŝajne uzadas la infanojn, kiel kvazaŭan imposton.

Tio estas ankaŭ rimedo por la movado, firmigi sian hegemonion kontraŭ la loĝantoj. Cele al tio, *Al Ŝabab* plenumas sturmatakojn en vilaĝoj, kaj forkaptas la infanojn. Ili premas la komunumajn ĉefojn, per mortominaco, ultimatoj, murdoj, por ke la loĝantoj mem liveru siajn knabojn kaj knabinojn.

Tio okazigas alian konsekvencon: la vilaĝanoj sendas siajn gefilojn, solajn, al la urboj ekster la areoj, kie regas *Al Ŝabab*. «Multaj gepatroj opinias, ke tio estas la sola solvo, por ke iliaj gefiloj estu en sekureco», eksplikas Laetitia BADER. Tamen la vojaĝo al kelkaj urboj estas danĝera por tiuj vundeblaj junuloj. Tie, kelkaj estas gastigitaj fare de familianoj, aliaj atingas la kampadejojn de delokitoj. Kelkafoje, loĝantoj ankaŭ decidas pri kreo de strukturoj por subteni ilin.

Neniam Milito Inter Ni

Kiel blankaj sangoĉeloj estas trejneblaj

La homa imunsistemo havas memoron - infektoj efikas al la praĉeloj de la blankaj sangoĉeloj (leŭkocitoj), tiun funkcion oni volas uzi en la kontraŭkancera terapio.

La homa imundefendo aplikas trukecan strategion. Estas du ĉefaj sistemoj kiuj protektas la homojn kontraŭ infektoj, nome la denaska kaj la akirita imuneco. La unua estas kvazaŭ la korpa respondo je infektoj, por gajni tempon ĝis la akirita, aŭ adapta, imuneco aktiviĝas kaj daŭrigas la komencitan laboron.

La adapta imuneco identigas kaj kontraŭbatalas la infektantojn laŭ tre specifa maniero kaj konstruas imunologian memoron. Tiel la organismo "memoras" pri la pli fruaj defioj kaj reagas pli rapide kaj pli forte, se estonte la samaj infektantoj aperas.

Kvankam la imunologia memoro estis konsiderata ekskluziva eco de la adaptiva imuneco, tiu scienca opinio antaŭ nelonge estis kontestita de pluraj esplorgrupoj. Precipe certaj mikrobaj infektoj aŭ vakcinaĵoj akcelas pli fortan reagon de blankaj sangoĉeloj je pli posta infekto per la samaj aŭ eĉ malsamaj patogenaj infektantoj.

Tiu procezo de la denaska imunologia memoro estas nomata trejnita denaska

imuneco, ĉar blankaj sangoĉeloj per taŭgaj ekscitoj povas esti "trejnataj" por povi reagi pli rapide kaj pli forte kontraŭ estontaj infektoj.


La trejnita denaska imuneco havas impresajn longtempajn efikojn, ĝis pluraj monatoj, kiuj estas surprizaj ĉar blankaj sangoĉeloj laŭregule havas nur relative mallongan vivodaŭron en la sangocirkulo.

Tiu paradokso nun per studaĵo de la instituto por

klinika ĥemio kaj laboratoria medicino en Dreseno estis solvita. Tiu studaĵo montris ke trejnita denaska imuneco efikas al la praĉeloj de la cirkulantaj blankaj sangoĉeloj.

Ĉar tiuj praĉeloj povas produkti multajn generaciojn de blankaj sangoĉeloj, la studaĵo povus ekspliki la longtempajn efikojn de la trejnita denaska imuneco. La esplorista skipo en Dreseno eltrovis ke la imuntrejnado de la praĉeloj per beta-glukano [glukagono?] povus konduki al daŭra pozitiva reago de la sangoprodukta sistemo. Jen efiko kiu povus helpi ke la produktiĝo de blankaj sangoĉeloj estu denove plirapidigebla - ĉar dum la kontraŭkancera ĥemioterapio tiu procezo estas elbremsita.

Esperanta Retradio





Trovitas ligo inter eksplodoj de supernovaoj kaj vetero surtere

Esploristoj de la Teknika Universitato de Danlando malkovris, ke kosmaj radioj, ellasataj dum eksplodo de steloj havas mezureblan influon al la vetero surtere. Supernovao, kiu okazas en la tutfina momento de la stelvivo kaj rezultas je amasa eksplodo ellasas kosmajn radiojn, kiuj influas la formadon de nuboj surtere. Pro apero de nuboj vetero iĝas pli malvarma. “Finfine ni havas la lastan eron de la mozaiko klariganta kiel partikloj el la spaco influas la veteron surtere” - diras Doktoro Henrik SVENSMARK, gvidanta aŭtoro de la esploro publikigita en la eldono *Nature Communications*. “Tio estigas komprenon pri kiel ŝanĝoj kaŭzataj de suna aktiveco povas ŝanĝi la klimaton”.

La esploristoj malkovris, ke kosmaj radioj, ellasataj de supernovao elpuŝas elektronojn el la atmosferaj partikloj de Tero kreante jonojn, kiuj pligrandigas la kvanton de nubonaskaj kernoj aŭ “semoj” por formado de nuboj. Jonigo kapabligas malgrandegajn

partiklojn kaj molekulojn de la atmosfero ekzisti pli longe, ebligante pli facilan procezon de nuboformado. Pro la fakto, ke nuboj forte influas la kvanton de sunenergio atinganta la tersurfacon, ĉi-malkovro klarigas la eventojn, okazintajn rilate al klimato pasintec kaj helpas prognozi tiujn estontec.

Ekzemple, la ligo inter supernovao kaj formado de nuboj similas al ŝlosila rolo de suna aktiveco en la Mezepoka Varmperiodo (ĉirkaŭ la 1000-a jaro) kaj la malvarma periodo konata kiel Malgranda Glacia Epoko (1300-1900). La esploristoj ankaŭ malkovris, ke la Suno influas la nivelon de kosmaj radioj atingantaj la Teron, kio siavice influas la efikon de supernovaa radioj rilate al la klimato. Kiam la Suno estas magnete aktiva, do malpli da kosmaj radioj venas al la Tero, se male, do pli da radioj trairas la atmosferon. La influo de kosmaj radioj kaj suna aktiveco al la Tera klimato povas rilati al lastaj klimataj eventoj kiel ŝanĝoj, observataj en la 20-a jarcento kaj varmiĝo aŭ malvarmiĝo dum la lastaj 10 000 jaroj.

Kirill NOVIČENKO
Interalie

Rubén DARÍO

La 18-an de januaro estas la datreveno de la naskiĝo (en 1867) de la nikaragva poeto kaj diplomato Félix Rubén García SARMIENTO, konata per la pseŭdonimo Rubén DARÍO (1867-1916).

Li estis fruega talentulo: aĝante nur 13 jarojn li verkadis artikolojn por lokaj gazetoj; je 16 li verkis kaj recitis publike odon dum la solenoj honore al la Liberiginto Simón BOLÍVAR e 21, per la verko titolita “Azul” publikigita en Valparaíso (Ĉilio), lanĉis la hispanamerikan literaturan movadon konatan kiel “Modernismo”.

Jen Rubén DARÍO jen lia samtempulo José MARTÍ (1853-1895) kontestis la entrudiĝemon de Usono en la aferojn de Latina Ameriko; sed, dum José MARTÍ batalis (kaj mortis en milito) kontraŭ Hispanio por la sendependeco de Kubo, Rubén DARÍO restis fidela al Hispanio, tamen gardante lojalecon al Nikaragvo, kies diplomato li estis; pri tio, ŝajnas al mi ekvidi internan konflikton en ĉi tiu verso, entenata en la poeziaĵo “Los cisnes” (La cignoj):

“Soy un hijo de América, soy un nieto de España”
(Mi estas filo de Ameriko, mi estas nepo de Hispanio).

Rubén DARÍO vivis longatempe en eksterlando (li estis difinta “nomada poeto”, kaj revenis al la patrolando nur en 1915, nelonge antaŭ sia morto, okazinta pro cirozo je nuraj 49 jaroj); aparte, krom en Bonaero en Argentino, li estis en Parizo (kie li amikiĝis al Paul VERLAINE, imitante lian poezian stilon kaj la diboĉan vivmanieron) kaj en Hispanio (kie li konis, interalie,

Miguel de UNAMUNO kaj Pío BAROJA Y NESSI.

Lia longa restado en Hispanio, dum periodo kulture regata de la tiel dirita “*Generación del 98*” (Generacio de 1898) kaŭzas, ke kelkaj metas Rubén DARÍO inter la hispanajn poetojn, pli ol inter tiujn hispanamerikajn, kvankam, kiel ja dirite, ĝuste Rubén DARÍO estas la fondinto de la hispanamerika literatura movado “Modernismo”.

Mi transskribas kelkajn pliajn versojn de la poeziaĵo “*Los cisnes*” (La cignoj), cititajn en interveno de

Andrea Chiti-Batelli en la speciala numero de “*L’Esperanto*” 1992-3,4 (Aktoj de la Ronda Tablo de Torino pri “Esperanto por la defendo de la etnaj ligvoj kaj kulturoj”), el kiuj travideblas la zorgo pro la kreskanta kaj progresiva superregado de la anglosaksa lingvo kaj kulturo:

¿Seremos entregados a los bárbaros fieros?
¿Tantos millones de hombres hablaremos inglés?
¿Ya no hay nobles hidalgos ni bravos caballeros?
¿Callaremos ahora para llorar después?

Ĉu ni estos transdonataj al krudaj barbaroj?
Ĉu tiom milionoj da homoj ni parolos angle?
Ĉu ne plu estas noblaj ĝentilhomoj nek bravaj kavaliroj?
Ĉu ni silentos nun por plori poste?
trad. ADS

La poeziaĵo, tamen, havas optimisman finon:

...Y un Cisne negro dijo: “La noche anuncia el día”.
Y uno blanco: “¡La aurora es inmortal, la aurora es inmortal!” ¡Oh tierras de sol y de armonía,

aun guarda la Esperanza la caja de Pandora!

...Kaj cigno nigra diris: "Nokto anoncas tagon".

Kaj unu blanka: "Aŭroro estas senmorta, aŭroro estas senmorta!". Ho landoj de suno kaj de harmonio, ankoraŭ gardas la Esperon la kesto de Pandora!
trad. ADS

Mi transskribas, krome, la hispanan tekston de la poeziaĵo "Sonatina" de Rubén DARÍO (kiu parolas pri sopiro al amo kaj libero) kaj ĝian version en Esperanto (Sonateto), de Juan de OYARZBAL Y ORUETA (el "Esperanto de UEA" 1958-1, p. 5; tria premio en la Belarta Konkurso de UEA 1957 pri tradukita poezio).

Sonatina

La princesa está triste... ¿Qué tendrá la princesa?

*Los suspiros se escapan de su boca de fresa,
que ha perdido la risa, que ha perdido el color.
La princesa está pálida en su silla de oro,
está mudo el teclado de su clave sonoro,
y en un vaso, olvidada, se desmaya una flor.*

*El jardín puebla el triunfo de los pavos reales.
Parlanchina, la dueña dice cosas banales,
y vestido de rojo piruetea el bufón.
La princesa no ríe, la princesa no siente;
la princesa persigue por el cielo de Oriente
la libélula vaga de una vaga ilusión.*

*¿Piensa, acaso, en el príncipe de Golconda o de China,
o en el que ha detenido su carroza argentina
para ver de sus ojos la dulzura de luz?
¿O en el rey de las islas de las rosas fragantes,
o en el que es soberano de los claros diamantes,
o en el dueño orgulloso de las perlas de*

Ormuz?

*¡Ay!, la pobre princesa de la boca de rosa
quiere ser golondrina, quiere ser mariposa,
tener alas ligeras, bajo el cielo volar;
ir al sol por la escala luminosa de un rayo,
saludar a los lirios con los versos de mayo
o perderse en el viento sobre el trueno del mar.*

*Ya no quiere el palacio, ni la rueda de plata,
ni el halcón encantado, ni el bufón escarlata,
ni los cisnes unánimes en el lago de azur.
Y están tristes las flores por la flor de la corte,
los jazmines de Oriente, los nelumbos del Norte,
de Occidente las dalias y las rosas del Sur.*

*¡Pobrecita princesa de los ojos azules!
Está presa en sus oros, está presa en sus tules,
en la jaula de mármol del palacio real;
el palacio soberbio que vigilan los guardas,
que custodian cien negros con sus cien
alabardas,
un lebrél que no duerme y un dragón colosal.*

*¡Oh, quién fuera hipsipila que dejó la crisálida!
(La princesa está triste, la princesa está pálida)
¡Oh visión adorada de oro, rosa y marfil!
¡Quién volara a la tierra donde un príncipe
existe,
—la princesa está pálida, la princesa está triste—,
más brillante que el alba, más hermoso que abril!*

*—«Calla, calla, princesa —dice el hada
madrina—;
en caballo, con alas, hacia acá se encamina,
en el cinto la espada y en la mano el azor,
el feliz caballero que te adora sin verte,
y que llega de lejos, vencedor de la Muerte,
a encenderte los labios con un beso de amor».*

Rubén DARÍO

Sonateto

*La princino malĝojas... Kio ŝin malĝojigas?
Ŝia buso fragruĝa la vespirojn malligas,
kaj en ĝi jam ne estas plu la rid' kaj kolor',
La princin' sidas pala sur la granda ortrono,
de l' sonora klavaro formutiĝis la sono;
kaj en vaz', forgesite, elsvenadas la flor'.*

*Babilema mastrino banalaĵojn parolas,
en helruĝa kostumo burleskul' kapriolas,
dum okazas de l' pavo la parad' en la ĝarden'.
La princino ne ridas, la princino nur mutas;
la flugantan libelon la princin' persekutas
de esper' en ĉielo ie en Orient'.*

*Ĉu pri l' princ' de Golkondo aŭ Ĉinuĵ' ŝi
sopiras,
aŭ pri kiu la dolĉajn lumokulojn admiras,
kaleŝegon arĝentan haltiginte ĉe ŝi;
aŭ de l' perloj Ormuzaj pri l' fiera reganto,
pri la mastro de ĉiu plej helega diamanto,
de l' insuloj de l' rozoj pri la bela reĝid'?*

*La rozbuŝa princino kompatinda sopiras
pri rapidaj flugiloj, ŝi forflugi deziras,
papili' volas esti, volas esti hirund',
elsaluti l' iridojn per printemp-poezio,
en la vent' malaperi sur la tondra markrio,
aŭ lumvoj' de radio elmarŝadi al sun'.*

*Jam ne gravas la falko, la puncvesta pajaco,
radŝpinil' el arĝento, la mirinda palaco,
aŭ la cignoj sur blua lazurlag' en akord'.
Kaj malĝojas pro l' floro de l' korteg' en
ĝardenoj
ĉiuj rozoj de l' Sudo, Orientaj jazmenoj;
Okcidentaj dalioj kaj nimfeoj de l' Nord'.*


*Kompatinda princino de la bluaj okuloj!
Ŝin katenas la oro, ŝin katenas la tuloj,
en la kaĝo marmora de la reĝa korteg':
la impona palaco protektata de qardoj,
de cent negroj kun siaj longaj cent helebardoj,
leporhund' nedormanta kaj kolosa drakeg'.*

*Papilio feliĉa el kokono foriĝas!
(La princino ne ridas. La princino paliĝas.)
Ho, revbildo pri rozoj, kaj eburo, kaj or'!
En la landon de princo ŝi alflugi avidas
(la princino paliĝas; la princino ne ridas),
pli belegan kaj brilan ol april' kaj aŭror'!*

*– Nur silentu, princino – la feino susuras;
sur ĉeval' flugilhava al ĉi tie jam kuras,
kun ĉasbirdo sur mano kaj en ingo la spad',
kavaliro feliĉa, kiu amas vin blinde,
kaj el fore alvenas, eĉ la Morton venkinte,
viajn lipojn ardigi per amfajra kisd',*

Rubén DARÍO, trad. Juan de OYARZBAL Y ORUETA
("Esperanto de UEA" 1958-1, p. 5)

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo



Edgar Allan Poe

Edgar Allan Poe ('edgər 'ælən pəʊ) estis aŭtoro de poeziaĵoj, romanoj kaj rakontoj. Plej famaj ĝis nun estas liaj hororaj rakontoj kaj lia tiutempe tute nova formo de krimliteraturo, kiu poste influis i.a. la aŭtoron Arthur Conan Doyle.

En Esperanto aperis pluraj tradukoj.

Vikipedio